# PREZIDANTA BULTENO

Universala Medicina Esperanto-Asocio | Fondita 1908 | Aliĝinta al UEA

## Jubileo de Medicina Internacia Revuo (MIR): 100 jarojn!

Baldaŭ aperos jubilea eldono de nia medicinscienca ĵurnalo, Medicina Internacia Revuo. En tiu ĉi jaro MIR centjariĝas! Ekde la 100-a eldono (la nuna estos numero 120) la scienca nivelo de la revuo rimarkeble plialtiĝis. La sukceso de MIR dum la pasintaj jardekoj estis la elstara merito de profesoro Vladimiro Opoka el Krakovo, Pollando, ĉefredaktoro de MIR depost 1994! Pro tiu kaj ĝenerale sia laboro ene de UMEA profesoro Opoka ricevis la premion pro „Elstara Agado" de la UMEA en la jaro 2015. MIR ekde la komenco en 1923 devis adapti sin al la ŝanceliĝintaj fatoj kaj de la Esperanto-movado kaj de la scienca progreso. Nepre verku sciencajn artikolojn en Esperanto por apogi nian revuon!

## Distingo PRO URBE de Hódmezővásárhely, Hungario, por Katarina Faragó



La 15-an de Marto 2023 s-ino Katarina Faragó pro siaj meritoj ricevis el la manoj de la urbestro de Hódmezővásárhely, D-ro Péter Márki-Zay, la distingon „PRO URBE" en la granda halo de la urba domo. Okazis solena ceremonio kun ĉeesto de multaj altrangaj oficistoj kaj reprezentantoj de la loka civitanaro. Per la premio oni honorigis la ege ampleksan agado de s-ino Faragó en la urbo, kiel ekzemple la laboron por Esperanto, kunigante internaciajn medicinistojn kadre de la IMEK-oj, sed ankaŭ ŝian kuracan laboron per apliko de la Yumeiho-premknedmasaĝo, kies plej altranga ina spertulo ŝi estas. La tuta UMEA ege ĝojas kune kun la distingitulino kaj fieras havi ŝin en nia rondo.

## Trilingvaj tradukhelpiloj por la medicina prizorgo de ukrainaj rifuĝintoj

...troviĝas en nia retpaĝaro kaj estas bone uzitaj kaj ofte elŝutitaj. La plej nova estas versio en la dana lingvo. Ĉiuj estas invititaj aldoni pliajn lingvojn uzante la nur-esperantan version de la manlibro. Bv. elekti nur lingvojn, kiuj ne jam estas enhavitaj en la fonto, nome la libro malantaŭ tiu ĉi ligilo:
https://link.springer.com/book/10.1007/978-3-662-48739-6

## Raportoj de la Landaj Delegitoj

...verdire dum al unua duonjaro ne abundis. Do pri interesaj eventoj ni ĉi-loke ne povas diri ion interesan.

## Loko kaj jaro de la venonta IMEK

...estas ankoraŭ objekto de pridiskuto kaj planado. Taŭga loko povas esti Kaŭno in Litovio, sed la tieaj respondeculoj preferas kongresumi en 2025, ne en 2024. Ni informos vin pri la evoluoj.

## Forpasis D-ro István Hegyi (1926-1932)

En sia 96-a jaro, la 11-an de januaro 2023 forpasis en Budapeŝto d-ro István Hegyi, kuracisto, elstara partoprenanto de la Esperanto-movado. Li studis en la Benediktana Gimnazio de urbo Győr kaj faris abiturientan ekzamenon en 1945. Poste li iĝis studento de la Medicina Universitato en urbo Debrecen. Lian patron la tiama politika reĝimo eksigis el sia laborposteno, tiel la familio restis sen mono. István devis forlasi la universitaton kaj labori por gajni monon. Li povis nur en 1951 rekomenci la studadon en la Medicina Universitato de urbo Szeged, kie li ricevis kuracistan diplomon en 1957. Lia unua laborloko estis la urba hospitalo de Veszprém. Intertempe li trapasis pediatrian fakekzamenon kaj iĝis infankuracisto ĝis 1968. Tiam li komencis labori en la medicina fako de la Departementa Konsilantaro, kiel ĉefkuracisto ĝis emeritiĝo (1981). Kun Esperanto li konatiĝis en 1964 kaj iĝis aktivulo en la movado. Li fondis en sia urbo Esperanto-fakgrupon. Unuafoje en la historio de UMEA li ricevis UMEA-Shinoda-Premion (arĝentan medalon, diplomon, monsumon) pro sia fakartikolo aperinta en la Medicina Internacia Revuo (MIR). Poste aperis dum jaroj liaj 45 fakartikoloj en la revuo. Li partoprenis multajn Internaciajn Medicinistajn Esperanto-Kongresojn (IMEK) kun prelegoj. Longtempe kiel docento li agadis en la Internacia Akademio de San Marino. Pro volontulaj servoj en Veszprém li ricevis diversajn distingojn, inter ili la „Pro Urbe Veszprém" honorigon. En sia libertempo li pretigis plurcent oleopentraĵojn, ĉi tiujn prezentis en kelkaj ekspozicioj. Krome li desegnis karikaturojn kaj redaktis vortenigmojn. Lia forpaso estas granda perdo por la Esperanto-movado. Ni gardas lian memoron. Ripozu en paco!

## Okazis reta kunveno kun TEJO-anoj

La 2-an de Aprilo okazis renkontiĝo kune kun membroj de TEJO, kiuj interesiĝis pri la laboro de nia faka asocio. Estis vigla elŝanĝo kaj espereble instigo por la junaj partoprenantoj apogi nian asocion per formala aliĝo kaj kunlaboro.

